

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Vi ekaŭdas radioprelegaron redaktita antaŭ kvin jaroj fer nia antaŭulo Charles Ecabert kaj dediĉita al grandaj svisaj pedagogoj.

A.- « *Jean-Jacques Rousseau certe estas unu el la malplej forlaseblaj figuroj de la pasintaj jarcentoj. Lia influo sur la eŭropan kaj mondan penson politike, socie, filozofie, edukade, estas kvazaŭ ne mezurebla, tiom ĝi estis profunda kaj multflanka.*

Cl.- *Ne ĉio estas aprobinda en lia verkaro kaj pensaro. La familiaj, sociaj, politikaj cirkonstancoj de lia vivo instigis lin akcenti bazajn principojn, kiuj estas diskutablaj, precipe tiu de la natura boneco de la homo. Sendube, la socio tro ofte malbonigas la homon, sed estas same vere, ke ne ĉiuj virtoj kernas en la homa koro. La homo fariĝas plene homa nur pere de konstanta batalo kontraŭ si mem, pere de senĉesa antaŭeniro al la plibono, pere de nelacigeblaj venkoj sur siaj difektoj kaj pasioj, streĉiga klopodo, kiu nomiĝas eduko. Hodiaŭ pli ol ĉiam oni sentas la gravecon de la edukaj problemoj. Plago de nia epoko estas tiomaj sentaŭguloj, kiuj furiozas en ĉiaj grandaj kaj negrandaj urboj, kaj eĉ vilaĝoj. La gepatroj, ve, ne sufiĉe kapablas eduki la gefilojn. Edukado estas kaj estos la plej grava demando en tiu jarcento. Nu precize pri edukado troviĝas en la ellaboraĵo de Rousseau ege interesaj veroj, kvankam li mem tute ne prizorgis la proprajn kvin filojn, forlasante ilin al la publika institucio nomata Trovitaj Infanoj. Tamen pri tio li ĉiam pruvis internan maltrankvilon tiel, ke unu tagon de la somero 1761, kiam li kredis sin baldaŭ mortonta, li konfesis per iu letero al la Marŝalino de Luksemburgo :*

A.- « *Ekde pluraj jaroj rimorso pri tiu malzorgo malkvietigas min, kaj mi mortos ne kapablante ĝin ripari, kion ilia patrino kaj mi ege bedaŭras. »*

Cl.- *En la fama prieduka libro **Emilo** li skribis la jenajn emociigajn parolojn :*

A.- « *Kiu ne kapablas plenumi la patrajn devojn, ne rajtas iĝi patro. Nek malriĉeco, nek okupoj, nek moktimo lin sendevigu nutri kaj eduki li mem siajn infanojn. Leganto, vi povas pri tio min kredi. Mi antaŭdiras al ĉiu ajn sentkora, kiu estas neglektanta tiel sanktajn taskojn, ke longan tempon li verŝos sur sian kulpon maldolĉajn larmojn kaj neniam konsoliĝos pri tio. »*

Cl.- *Kia tragika sincereco ! Regantaj trajtoj de la karaktero de Rousseau estas, flanke de nekredebla ŝanĝiĝemo kaj konsterniga senvolo, terura sinceremo kaj subtila kompreno de la homkoraj misteroj. En la unua linio de liaj **Konfeso**j li deklaras :*

A.- « *Jen ekzakte laŭnature en tuta vereco pentrita la sola homa portreto, kiu ekzistas kaj probable iam ekzistos... Eksonu la lastjuĝa trompeto, kiam vi volos, mi venos, tiun ĉi libron en la mano, por min prezenti antaŭ la suverenan Juĝiston. Mi laŭtege diros : Jen kion mi faris, kion mi pensis, kio mi estis ! Mi diris la bonon kaj la malbonon kun la sama sincereco ! »*

Cl.- *Tia sinteno ne estiĝas sen ia dozo de kuraĝo. Sed tio, kio grandmezure senpekigas Rousseau, estas lia amo al la homaro kaj precipe al la infanaro. Lin tiel zorgigas la edukaj problemoj, ke unu el liaj ĉefaj plej influhavaj verkoj dediĉiĝas al edukado. Mi jam nomis la faman **Emilo**. Kaj ĉar mi profesie okupiĝas, diras Charles Ecabert, pri tiuspecaj demandoj, mi volonte pristudos, dum tiu ĉi kaj la sekvonta disaŭdigo, kelkajn interesaj punktojn el tiu libro. Je la sojlo de la verko laŭtiĝas espera parolo. Rousseau elprenas la moton, sub kies aŭspiciojn li metas la tutan libron, el la roma filozofo Seneko :*

A.- « Kuraceblaj estas niaj malsanoj, se ni volas pliboniĝi ; nin helpas la naturo, ĉar ni nature direktiĝas al justo. »

Cl.- La du unuaj libroj el la kvin de la verko konsideras la junuleton dum lia infaneco, ĝis 12 jaroj. Ĉe tiuj ni hodiaŭ haltos, dise spikumante utilajn rimarkojn. Reage al la civilizacio de sia tempo, re-al-iĝinte al la antikva tradicio, en kiun enviciĝis Montaigne, Seneko, Epikteto, Markaŭrelo, Rousseau alte ŝatas naturon, naturan leĝon, naturan ordon.

A.- « En natura ordo homoj estante egalaj, ilia komuna celo estas la homa stato. »

Cl.- La konkero de tia homa stato komenciĝas ekde la naskiĝo.

A.- « Frue preparu la reĝon de la libereco, la uzon de liaj fortoj, lasante al lia korpo la naturan kutimon, lin kapabligante ĉiam sin mem estri kaj plenumi en ĉio la propran volon, tuj kiam li tian havos. »

Cl.- Tia liberan volon en la infano Rousseau difinas ene de striktaj limoj.

A.- « Via libero, via povo etendiĝas nur tiel vasten kiel viaj naturaj fortoj, ne pluen : Ĉio cetera estas nura sklaveco, iluzio, imponeco... Sola plenumas sian volon tiu, kiu ne bezonas pro tio plilongigi siajn brakojn pere de aliulaj... Tiamaniere la homo vere libera volas nur tion, kio al li plaĉas. Tia estas mia fundamenta maksimumo, temas nur pri ĝia aplikado al la infaneco, kaj ĉiuj edukaj reguloj el ĝi defluas. »

Cl.- Rousseau postulas:

A.- « Estu viaj rifuzoj nenuligeblaj. Nenia trudado vin ŝancelu. La **ne** prononcita estu bronza muro, kontraŭ kiu elĉerpinte kvin aŭ ses foje fortojn, li ne plu penos ĝin renversi. »

Cl.- Rousseau ankoraŭ demandas :

A.- « Ĉu vi scias la plej efikan rimedon por igi vian infanon malfeliĉa ? Tio estas lin alkutimigi je la atingo de ĉio, ĉar liaj deziroj kreskos konstante per la facila kontentigo de ili... Unue li volos la bastonon, kiun vi tenas, baldaŭ li volos vian poŝhorloĝon, poste la birdon, kiu preterflugas, li volos la stelon, kiu brilas antaŭ viaj okuloj, li volos ĉion, kion li vidos. Krom se vi estas Dio, kiel vi kontentigos lin ? »

Cl.- Jen do la junuleto, 12-jara, alkondukita tra la lando de la sentoj ĝis la limo de la infana racio. Trans tiu limo ekfaktiviĝos la unua vira paŝo.

A.- « Li alvenis al la infaneca maturo, travivis infanan vivon, ne aĉetinte la perfektan prezo de la feliĉo. Male ambaŭ reciproke kunagis. Akirante la tutan laŭaĝan racion, li estis feliĉa kaj libera, laŭ tuta kapableco de sia konstitucio. »

Cl.- Libereco kaj feliĉo, jen la du dominantaj temoj en la eduka teorio de Rousseau rilate la infanecon, konkludas Charles Ecabert.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Kun niaj bondeziroj por la nova jaro ni diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-